

## La fabeloj de “Mil kaj unu noktoj” en la kunteksto de la germana literaturo (*Wieland / Goethe / Hauff*)

Galina G. IŠIMBAEVA

### Enkonduko

En la jaroj 1707-1717 Galano (*Antonio GALLAN*) tradukas el la araba lingvo en la francan la fabelojn el “Mil kaj unu noktoj”, kies eldono fariĝis vera evento en la kultura vivo de Eŭropo. Aparte interesa estas la sorto de tiuj fabeloj en Germanio en la lasta triono de la XVIII-a ĝis la unua triono de la XIX-a jarcento, kiam klare evidentiĝis diversaj metodoj de ilia aktualigo en alinacia kulturo.

### *Wieland* – la popularigisto

La unua popularigisto de la orienta fabelo en Germanio estis Vilando (*Christoph Martin WIELAND*, 1733-1813). En la turinĝia urbo Vejmaro (*Weimar*) li eldonas la periodaĵon “Germana Merkuro”, en kiu li regule publikigas tradukojn el la fabeloj de Ŝeherazado (*Scheherazade*). En la jaro 1772 li publikigas sian romanon “Ora Spegulo” (aŭ “Reĝoj de Ŝaŝiano”), stiligitan laŭ la maniero en “Mil kaj unu noktoj”, kaj fariĝas unu el la “fondintoj de la modo pri arabeskoj” en Germanio.

Vilando okupiĝadas pri tiu ĝenro, por kiu li elpensis la terminon de “fea fabelo”. Li verkis ekz. la orientecajn fabelojn “Idriso kaj Cenido” (1765), “Ĵano kaj Gulcenho aŭ Multe diri - nenion diri. Orienta fabelo.” (1773), “Vintra Fabelo” (1776),

“Ŝaho Lolo” (1778). En la jaroj 1786/1789 Vilando efektivas la eldonon de “Ĝinistano, aŭ Elektitaj feaj kaj miraklaj fabeloj, parte novkreitaj, parte novtraduk itaj kaj prilaboritaj”. Tiu ĉi eldono ludis grandan rolon en la germana beletra orientalismo. La fabela Oriento “laŭ Vilando” aperas en lia verko “Oberono” (1780), kies protagonisto, mezepoka kavaliro, enamiĝas al la princino de Bagdado kaj travivas multajn aventurojn en Babilono, Damasko kaj Bagdado. La ekzotikeco de la orienta fabelo ne kaŝas ĝian aktualecon, ĉar la aŭtoro kritike pritaksas multajn sociajn fenomenojn.

### *Goethe* – la eksperimentisto

Goeto (*Johann Wolfgang VON GOETHE*, 1749-1832) konis arabajn fabelojn en francaj kaj germanaj tradukoj. Sed ĝuste Vilando vekis apartan intereson de Goeto al la orientfabela ĝenro. Goeto verkis “Konversaciojn de germanaj rifuĝintoj” (1795) kaj jam parolas pri sia intereso al la orienta literaturo en letero al Ŝilero (*Friedrich von SCHILLER*, 1759-1805) la 2-an de decembro 1794, en kiu li skribas, ke en tiuj “Konversacioj de germanaj rifuĝintoj” li “...intencas agi same kiel la fabelrakontistino de 1001 noktoj” (*Goethe/Schiller*: “Korespondado” en 2 volumoj, Vol.1, p. 69).

Estas vero, ke la “leĝera orienta vento” sentebblas en la “Konversacioj de germanaj rifuĝintoj”. Ĉi tie la aŭtoro uzas la “kadran” kompozicion de orientaj fabelaroj (hindaj – “Panĉatantro”, arabaj – “Mil kaj unu noktoj”, persaj – “Tuti-namo”), li donas “araban fabelan ŝlosilon” por kompreni la ideon de la aŭtoro kaj li uzas orientajn antaŭnomojn, orientajn vortojn (“karavano”, “turkoj”), geografiajn nomojn (Samarkando, Ormuzo), li aktualigas tradiciajn temojn, ekz. ligitajn kun Aleksandrio.

Sed ni opinias, ke ankoraŭ pli gravas aliaj momentoj. Ekzemple, la historio de la komercisto en la “Konversacioj de germanaj rifuĝintoj” rekte aludas al la “kadra” parto de “Mil kaj unu noktoj”, kiu klarigas la antaŭhistorion de la kruelo de

Ŝahrijaro. Ŝahrijaro kaj lia juna frato hazarde malkovras la mal-fidelon de siaj amataj edzinoj. Pro tio ili lasas ĉiujn aferojn kaj vojaĝas tra la mondo por konvinki sin, ke ne eblas malhelpi la virinon diboĉi: ju pli severe vi kontrolas ŝin, des pli certe ŝi trompos vin.

La komercisto (en la verko de Goeto) forveturante en Aleksandrijo, persistas, ke lia amata edzino por la tempo de lia foresto elektu iun dignan viron kiel anstataŭanton. Evidente tio ŝajnas aroga kaj frivola kompare kun la muzulmana pensmaniero de Ŝahrijaro.

Sed ĉi tie ni vidas trajtojn de parodio de orientaj despotoj kaj ankaŭ de aŭtoparodio (se ni ekmemoras la komplikajn rilatojn de Goeto kun siaj multanombraj amatinoj, de kiuj li “forkuris” el Frankfurto en Vejmaron kaj el Vejmaro en Italion...).

Gravas substreki, ke la formo, same kiel la enhavo de la lasta novelo en “Konversacioj de germanaj rifuĝintoj” (kun la titolo “Fabeloj”) venas el fabeloj de “Mil kaj unu noktoj”, aparte de la bagdada kaj la egipta ciklo.

En la fabeloj de Goeto, same kiel en la fabeloj pri Harun-al-Raŝido, ni vidas du nivelojn de la temo: tute realan, ĉiutagecan – kaj nerealan, kie aperas misteraj objektoj aŭ estaĵoj, respektive, kie raciecaj bestoj estas amikoj aŭ malamikoj de la homo. En la fabeloj de Goeto aperas la motivo de la mirakla lampo de Aladino, kaŝitaj riĉaĵoj gardataj de Spiritoj kaj eĉ lumigilo posedanta miraklan povon. Sed tiuj verkoj ne plene kunfluiĝas kun fabelo – la aŭtoro estas samtempe interne kaj ekstere. Danke al tio liaj figuroj estas multsencaj kaj la temo akiras mitan karakteron.

Ni povas konstati, ke Goeto antaŭiris pli ol Vilando. Li rifuzis la stiligadon kaj kreis novan kampon por la araba fabelo en Germanio. Danke al li, en la fino de la XVIII-a jarcento la orienta popola fabelo trovis certan karakteron de la aŭtoro eŭropca arta novelo kun aforismeca moraliĝo.

### Hauff – la sintezisto

La lasta granda germana romantikisto-novelisto Vilhelmo Haŭfo (*Wilhelm HAUFF*, 1892-1927) trovis alian manieron por kompreni kaj uzi la orientan fabelon. Komence li interesiĝis pri fabeloj ĝenerale, iliaj arta temo, humuro, moralo, intereso.

Haŭf ege interesiĝis pri la verkaro de la fratoj *Jakob GRIMM* (1785-1863) kaj *Wilhelm GRIMM* (1786-1859), pri ilia scienca studo de la germana folkloro. Ili kolektis kaj eldonis “Infanajn kaj hejmajn fabelojn” en 1812-1814.

Tiu ĉi verko influis la rilaton de Haŭfo al la fabel-ĝenro. Pli malfrue post malkovro de “Mil kaj unu noktoj”, kolektiva verko de multaj tradukistoj, aperinta en la jaroj 1824-1825, Haŭf okupiĝis pri arabistiko.

La aŭtoraj fabeloj de Haŭfo estas verkitaj sub influo de la germana folkloro, la germana belarta fabelo kaj la orienta fabelo. Li verkis tri fabelajn ciklojn, du el ili orientiĝas je fabeloj de Ŝeherazado: “Fabel-almanako por la jaro 1826 por filoj kaj filinoj de edukitaj tavoloj” kaj “Almanako de fabeloj por la jaro 1827 por filoj kaj filinoj de edukitaj tavoloj”.

Tiuj ĉi almanakoj estas konataj same laŭ la titoloj de siaj “kdraj” fabeloj: “Karavano” kaj “Ŝejko el Aleksandrio kaj liaj sklavoj”. Vilhelmo Haŭf uzas en ili rekoneblajn orientajn motivojn kaj bildojn, li donas kolorajn bildojn pri la orienta ĉiutaga vivo, naturo, objektoj, realaĵoj de la spirita vivo, sed ne pretendas je adekvateco kaj vereco.

Liaj bildoj nur substrekas la ekzotikismon de jena mondo, tre fremda al eŭropano. Haŭfo ne havas tiom profundajn filozofiajn celojn kiel Hofmano (*Ernst Theodor Amadeus HOFFMANN*, 1776-1822) kun sia dumondeco.

Haŭf interesiĝas pri la “ĉiutaga vero” de siaj fabelaj fantazioj, ilia humaneco kaj didaktika flanko, ĉar li direktas sin “al la infanoj el edukitaj tavoloj”, kiuj por li reprezentas la estonton de Germanio.

## Konkludo

Tiumaniere la penetrado kaj integrado de la arabaj fabeloj de “Mil kaj unu noktoj” trairas tri sinsekvajn etapojn en la historio de la germana literaturo de la fino de la XVIII-a – komenco de la XIX-a jarcento.

Komence Vilando prezentas tiujn fabelojn “al la germana leganto”. Li, kiel vera klerigulo, vidis en ili la eblecon montri en kaŝita formo malvirtojn de la eŭropa civilizacio. Post li Goeto, uzante la tradiciojn de la orienta fabelo, kreis ĝenron novan por germana literaturo. Fine Haŭf\* revenigis la fabelon “en la infanan bibliotekon”, valorigante ĝian grandan eduk-povon.

Por la kleriguloj Vilando kaj Goeto, same kiel por la romantikisto Haŭfo, la Oriento iĝis metodo kaj kvazaŭ “trampolino” por starigi aktualajn ideologiajn, estetikajn kaj edukajn problemojn.

Vilando kreas sian propran orientan spacon kaj lernigas siajn samtempulojn trovi la novan alrigardon de la eŭropa vivo tra la orienta lupeo.

Goeto surbaze de la fabeloj de “Mil kaj unu noktoj” eksperimentas kaj ellaboras la regulojn de novelo, difinante ĝian evoluon en la estonto. Haŭf\* proksimigas la araban fabelon al la realo, forviŝante la limojn inter fabelo kaj realo, kaj sintezas ĝin kun aliaj ĝenroj solvante problemojn de edukado.

## Adreso de la aŭtorino

Dr. IŠIMBAEVA Galina Grigorjevna

a/k 181

RU – 450105 Ufa – 105

RUSIO

## Priaŭtora informo

La aŭtorino estas doktorino pri filologio, fakulino pri la germana literaturo de la XIX-a kaj XX-a jarcentoj kaj profesoro ĉe Baŝkiria Ŝtata Universitato en Ufa, Rusio.

## „Sorobano“, la japana formo de globkalkulilo abako

Conny MATHEUS

### Enkonduko

La abako estas tre malnova matematika ilo uzata por kalkulado. Ĝi vere estas unu el la unuaj rimedoj por efika kalkulado ĝis eĉ la hodiaŭa tempo. La plej oldaj formoj trovitaj havas proksimume 2500 jarojn, kaj la vorto abako devenas de la greka vorto "Abax". Ĝi signifas "kalkultabulo".

La originaj abako-tipoj estis ŝtonoj, ŝovitaj sur diversaj sulkoj, kiuj estis skrapitaj en lignajn aŭ ŝtonajn tabulojn. La sulkoj estis markitaj per punktoj, kiuj signifis la diversajn valorojn de la nombroj.

Pli poste oni konstruis tiun ĉi kalkulilon en kadran framon kaj ŝovis la ŝtonojn sur pluraj lignaj stangetoj. Tiel estiĝis la unuaj formoj de la abako, fakte aplikebla por ĉiuj kvar bazaj kalkuladmetodoj.

En la hodiaŭa tempo tri gravaj diversaj formoj de abakoj ekzistas kaj estas en uzado: unue la ĉina versio, nomata "Suan Pan", due la rusa formo "Stschotny" [ŝĉotni] kaj, trie, la plej bone konata, la japana "Sorobano". La ĉinan kalkulilon oni uzas jam ekde la 14-a jarcento, la malnovan japanan version ekde la 16-a jarcento – sed la pli moderna formo de la sorobano, kiun ankoraŭ hodiaŭ preskaŭ ĉiuj lernantoj en la bazlernejo devas uzi, datiĝas el la jaro 1930. Do, tre “juna” kalkulilo.

\* Prelego dum la 26-a Studsesio je 2005-07-01/03 kadre de Interkultura Centro Herzberg (ICH), Klerigejo de Germana Esperanto-Asocio.